

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencej

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 72 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 junio 1926

TO OUR NON-ESPERANTIST FRIENDS.

Radio broadcasting in the chief cities of Australia and other lands has of late familiarised listeners with the elementary principles of Esperanto—the international language—which seemingly has come to stay.

The auxiliary language has been adopted by the radio world as a medium for transmitting news and items of general interest, across seas and countries as far apart as Bagdad is from London.

The fact that people of all nations, speaking various national tongues, are able to hear and understand a secondary and common language, has a fascination which appeals to "the man in the street" equally with the student.

Few people in Australia other than Esperantists realise how rapidly the knowledge of Esperanto has spread not only among the western peoples but also among the oriental nations.

To many it is news to hear that quite presentable magazines, printed entirely in Esperanto, are published in countries such as Manchuria, Japan, Spain, Bulgaria, Rumania, Hungary, Russia, France, Italy, Finland, England, Portugal, Germany, Czechoslovakia, Denmark, Norway, Sweden, Australia and America.

Most remarkable perhaps is the claim put forward that some 6,000 works, including the New Testament, several of Shakespeare's plays and

many standard and classical works of literature from many countries in both hemispheres, have been published.

It must be admitted that anything which enables the people of diverse nations to read and study important questions from a viewpoint apart from their own, is undoubtedly worthy of consideration.

A common auxiliary language, capable of being used for international correspondence, holds out great possibilities for trade development.

With these ideas in mind it is not out of place to briefly scan what has been done towards stabilising a secondary means of communication between the various races.

Dr. W. J. Clark tells us in his interesting book, "International Language," that the philosopher, Descartes, in a letter, in 1629, forecasted a system of a regular universal grammar.

In 1653 Sir Thomas Urquhart published a volume entitled "An introduction to the Universal Language." Incidentally, Sir Thomas quaintly announces "printed and to be sold by Giles Calvert at the Black Spread Eagle at the west end of St. Paul's, and by Richard Tomlins at the Sun and Bible near Pye Corner." A Scotchman—Dalgarno—published "a proposed international language" in 1661. In 1668 Wilkins, Bishop of Chester, published an essay on "a philosophical language"; the Bishop was one of the founders of the Royal

Society. His system was a development of Dalgarnos. Leibnitz.—1646-1716—wrote many critical letters concerning a "philosophical international language."

Delormel, 1795, presented to the world "Projet d' une langue universelle."

Jean Francois Sudre, 1817, gave us "Langue musicale universelle." Grosselin, 1836, published "Systeme de langue universelle." Vidal, 1844, wrote "Langue universelle et analytique." Other authors of a proposed universal language appeared:—Letellier, 1852. Abbe Benifacio Satas Ochando, 1852, Madrid. Dyer, 1875. Reinaux, 1877. Maldent, 1877. Nicolas, 1900. Hilbe, 1901. Dietrich, 1902. Mannus Talundberg, 1904, and many other more or less eminent linguists.

Most people have heard of "Volapuk"; this auxiliary language originated in 1880, in Germany; it spread very rapidly in European countries and in 1889 there existed 283 Volapuk societies and instruction books in 25 languages. Three important congresses were held, but after the last of these the language languished and died.

Out of Volapuk an "improved" language was created "Idiom Neutral" but this also failed because, like Volapuk, it lacked simplicity and the capability of adaptation to national sounds. Then came "Esperanto," invented by a Polish doctor—Ludwig Lazarus Zamenhof—born in 1859, a native of Bialystok, a town notorious in Poland for its cosmopolitan inhabitants. Zamenhof as a boy was deeply impressed by the inter-racial tragedies of constant occurrence in his native town. As he grew up he devoted his life to the elaboration of a language which was to facilitate mutual peaceful intercourse among the ever warring races. He was essentially a practical idealist. The word "Esperanto" is the present participle of the verb *esperi*—"to hope"—used substantively, and it was under the pseudonym of "Dr. Esperanto" that Zamenhof published his scheme in 1887 at Warsaw.

His first book printed in Russian was followed by editions in French, German and English. "La Esperantisto," the first English Esperanto magazine appeared in 1889. In 1898 the Marquis de Beaufront founded "L'Esperantist." Other magazines

appeared in England shortly afterwards. From that time Esperanto has steadily progressed until to-day there are periodicals published in most countries of the world.

To the student, be he educated or comparatively so, the learning of Esperanto is peculiarly fascinating, chiefly because it is intensely logical and really scientific in its construction. Esperantists claim that the language may be learned in twelve months by continuous daily practice. If that statement be correct, then we shall be well repaid for the time devoted to acquiring a secondary language. Any academic discussion concerning Esperanto at the present stage of its development is superfluous and possibly undesirable. The tangible results attained after nearly forty years use are the true test of the practical capabilities of an international language. Esperanto is accepted by nearly every country in the world as a "clear" language for telegraphic purposes. It is accepted by the League of Nations, and used. Accepted and used as the international language by radio associations throughout the world, by Red Cross organisations, by tourist and railway authorities in the principal countries of Europe, by world known advertising firms, and by all the principal trade exhibitions which are held yearly in the great capital cities of Europe. Quite recently a radio broadcasting station was established in Switzerland for broadcasting news in Esperanto.

It is known that an ever increasing number of people are using the secondary language for commercial and other correspondence.

Esperanto seems to have established itself in Europe, and quite naturally the more distant nations are enquiring as to the possibilities towards increased trade and closer commercial relationship with the great consuming nations of Europe and Asia.

ESPERANTO IN THE INTERNATIONAL LABOUR OFFICE.

The International Labour Office of the League of Nations has for some five years past been using Esperanto for the purposes of the task assigned to it by the Treaties. It publishes a special Bulletin in Esperanto. It also issues its press communiques in Esperanto, in addition to the official languages, English and French.

KRONIKO.

MELBURNO. V. — La kunvenoj de la Melburna Esperanto Societo, dum la pasintaj semajnoj, estis pli interesplenaj ol kutime, pro la diversaj programoj. — S-ro Byatt kondukis tre instruajn lecionojn; kaj, laŭ lia facila kaj flua parolo s-ro. Hudson donis plezuron per daŭrigo de sia vojaĝrakonto. — S-ro. Darwin parolis pri sia vizito al la Suda Insulo de Nov Zelando, kaj lia bonstila parolado (bedaŭrinde en la angla lingvo) estis bone akceptita. — Je la 14a majo, tre ludinda konkurso, memorprovo, amuzigis la anojn, kaj s-ro. Ballard gajnis la premion. La debato "Ĉu la fraŭloj devus esti monpunataj?" elvokis elokventajn paroladojn kontraŭ la monpuno. La parolintoj esprimis kelkajn tre amuzajn kaj neatenditajn opiniojn pri la temo, kiuj estis la kaŭzo de multaj ŝercaj esprimoj.

S-ro E. J. Cox, honoro kasisto de la Societo gajnis la B. E. A. diplomon kun distingo, la anoj kore gratulis lin.

SYDNEY. — Vizitintoj al la klubego dummonate estis:—D-ro Domec el Saigon, Hinda-Hinujo, s-ino kaj f-ino Dewing el Remuera, Nov-Zelando, kaj novalveninto el Tallinn, Estonio.

Gazetartikoloj aperis en "Bulletin," "Wireless Weekly," "Radio" kaj "The Sun," kaj fotografaĵo de d-ro Domec en "Evening News."

"Trades Hall Broadcasting Station" (Laborista Disaŭdiga Stacio) kun voksignalo 2KY nuntempe negocas kun la loka societo por aranĝi tre baldaŭan disaŭdigadon de esperanta kurso. Detaloj en proksima numero.

Sub aŭspicioj de la "Workers' Educational Association" (Laborista Edukada Asocio) membroj de la Sydney Esperanto-Societo estis kondukitaj tra la nun finkonstruiganta unua parto de la subtera fervojo. Kelkaj vizitantoj ŝamideanoj partoprenis la instruplenan ekskurson.

Kiel paroladantoj ĉe la semajnaj kunvenoj oni havis s-ron D. Healy pri "Lingvaj Klarigoj," s-ron A. Feldmayr pri "Miaj spertoj en Genevo," kaj s-ron F. Simon pri "Radio kaj Esperanto." Aldone al tiu, tre sukcesa socia vespero estis festita kiun ankaŭ ĉeestis gastoj.

AUCKLAND, NOV-ZELANDO. — Dum la kunveno okazinta la 12 majo la ĉi tieaj Esperantistoj decidis revivigi la Auckland Esperanto-Asocio.

DUNEDIN, N.Z. — La klubo ne kunvenis dum la daŭro de la Sudmarara Ekspozicio, sed bona propagando estis farita, avizoj aperis en preskaŭ ĉiu solono, kaj lernolibroj estis venditaj. Lernantoj kunvenas ĉiuvendrede ĉe la Laborista Klubĉambro, kaj nun legas la verkon de Jack London — Forto de la Fortoj. La progresintoj jam legis, Kristnaska Ĝojkanto (Dickens), Teatraĵoj de Shakespeare, kaj Mirinda Amo (Luyken).

STOKE, N.Z. — Lernejestro Watkin faras bonan laboron por Esperanto, dum pasinta monato leteroj petantaj favoran rekomendon por Esperanto estis senditaj al la Komerca Ĉambro ĉe la kvar N.Z. centroj. Oni proponis Esperanton kiel temo por diskutado ĉe la Konferenco de Lernejestroj okazonta dum la kuranta monato.

WELLINGTON, N.Z. — Kiel rezulto de peto de la administranto de la loka Brodkasta Kompanio, mallongaj paroladoj pri Esperanto estos brodkastotaj per la ĉi tiea stacio. S-ro W. L. Edmanson malrapide plisaniĝas post sia severa malsaneco.

CLASSES held every Monday, 7.30 p.m., at 5 Aldred Road, Auckland, N.Z. All welcome. Visiting Esperantists ring 25-828.

ANEKDOTO PRI LA POETO HENLEY.

Mi estas la estro de mia sorto, La ŝipestro de mia animo.

Antaŭ kelke da tagoj mi trovis malnovan leteron de Henley priskribantan la cirkonstancojn en kiu li verkis tiun ĉi poemon. Li skribis: "Mi estis paciento en la malnova malsanulejo de Edinburgh. Mi aŭdis iom pri Lister, kaj mi tien iris kun lasta espero, se nur povus esti, savi al mi la piedon. Tiu grandfama kirurgo akceptis min, kiel li akceptis kaj akceptas ĉiujn, kun la plejgranda afableco, kaj dum dudek monatoj mi kuŝadis, aŭ en unu aŭ en alia el la hospitalaj ĉambroj de tiu malnova konstruaĵo, sub lia zorgado. Ĝi ŝajnis ŝehespera afero, sed li savis al mi la piedon, kaj jen mi estas." Jen li estis, kaj tio, kion li faris dum tiu "senespera" tempo estis, kanti ke li estas "estro de sia sorto."—J. M. Barrie.

KION NI ATINGIS KAJ VOLAS ATINGI PER ESPERANTO.

Mikologa Laboratorio de M. S. Dunin, Mosko (Ruslando) Ul. Gercena, d, 14, k. 21.

Nia laboratorio,

Esploras malsanojn de diversaj plantoj, kaŭzataj de la diversspecaj parazitaj fungoj el gento *Fusarium*'o Lk.

Por la esploro ni treege bezonas je la plej diversaj reprezentantoj de la nomita gento de la fungoj. Por ni estas tute necese ricevi la fungojn el ĉiuj lokoj de la mondo el ĉiuj klimataj regionaj, por ke ni povu diversmetode kompari samspecajn fungojn el diversaj lokoj kaj el diversaj plantoj. Ĉar por ni necesas tute egale la fungoj de ĉiuj lokoj de la mondo, ni decidis provi la lingvon internacian kiel rimedo dum niaj interrilatoj kun sciencistoj de ĉiuj landoj. Niaj kolegoj sciencistoj samlandaj en la komenco de la provo skeptikemi rimarkis, ke ni ricevos nenion realan per la artefarita lingvo, kiun la sciencistoj preskaŭ tute ne scias kaj tute ne uzas.

Sed ni esperis je la pera helpo de la esperantistoj ĉiulandaj. Ĉu ni eraris? Juĝa vi mem:

Per Esperanto ni interrilatigis kun esperantisto prof. D. Carbone (Milano, Italio). Kune kun li ni prijuĝis unu el problemoj de la esploro kaj nun ni faras kunan esploron. Dank' al pera helpo de prof. Carbone ni ricevis el Italujo kelke da kulturoj de la fusariumoj de prof. L. Montemartini (Pavia, Italujo).

Dank' al pera helpo de fama esperantisto M. Boubou (Orleans, Francujo) el Institut Pastour (Bari-zo) de nekonata sendinto ni ricevis du da kulturoj de la fusariumoj kaj kelke de specimenoj de semgrenoj el Alĝerio.

Dank' al pera helpa de germana esperantisto s-ro Murawkin (Berlin) ni interrilatigis kun tre fama esploristo de la fusariumoj d-ro Wollenweber, sendinta al ni siajn artikolojn kaj kelke da kulturoj de la fusariumoj.

Krom tio de samideanoj el Germanujo, Svisujo, Norvegujo kaj Francujo ni ricevis specimenojn de la semgrenoj infektitajn de la fungoj, listojn de botaniaj ĵurnaloj ktp.

Resumante ĉion, kion ni atingis per Esperantistara frata perado ni

esprimas nian la plej koran dankon al ĉiuj samideanoj iel ajn helpintaj al ni.

Samtempe ni konstatas jenon:

Tio, kion ni atingis, argumentas ke Esperanto povas servi eĉ en sciencaj aferoj.

Pro tio ni decidis nin turni al tutmonda esperantistaro kun komplemententa peto:

La farita provo diras, ke per Esperanta oni povas interrilatigi kun preskaŭ ĉiulandaj laboratorioj. Tamen ĝis nun en nia laboratorio longa vico de diversaj landoj ankoraŭ ne estas prezentitaj per la fusariumoj. Ni kredas kaj esperas ke esperantistoj de Hispanujo, Anglujo, Portugalujo, Svedujo, U.S.A. Suda Ameriko, Hindujo, Australio, Japanujo, Ĥinuĵo ktp. helpos al nia esploro.

Preskaŭ en ĉiu urbo estas esperantistoj. En tre multaj urboj estas mikrobiologiaj mikologiaj fito—(plant)—patologiaj kaj similaj laboratorioj. Ni petas ĉiulandajn esperantistojn disvastigi aldonajon al tiu ĉi alvokon traduki en ĉiuj landoj je ĉiuj lingvoj kaj dissindi, al ĉiuj mikrobiologiaj miko—kaj fitopatologiaj laboratorioj.

Se ni havos eblecon fari suface plenan (laŭ kvanto de ricevota materialo) esploron ni verkos kaj eldonos monografion pri fungoj unue en Esperanto.

—M. Dunin, V. Galiĉ, N. Goldmacher, N. Fejgincon. 23, xii-25.

LA KISO.

—La avino kaj ŝia nepino eniras magazenon de ludiloj.

—Kion kostas ĉi tio? demandas la filino.

La komercisto, kiu estis juna, ĉarmigis pro la beleco de la fraŭlino kaj ame deliris pro tia belaĵo. Li do volis aperigi sian amsenton kaj li respondas al ŝi:

—Du kisojn, Fraŭlino.

—Tre bone; mi akceptas, ŝi respondis.

Bonvolu enpaki ĉi tion.

Poste, preninte ĝin, kiam venis la momento por pagi, turnante sin al ŝia avino ŝi diras:

—Avino mia, bonvolu, mi petas, pagi al sinjoro tion, kion li postulis.

AL ĈIUJ MIKOLOGIAJ, MIKROBOL OGIAJ KAJ FITOPATHOLOGIAJ LABORATORIOJ.

Estimataj sinjoroj,

Por la entreprenita en nia laboratorio granda kompara esploro de ĉiuj specioj de la gento *Fusarium* o Lk., tute necese estas granda kvanto de la reprezentantoj de la gento.

Ekzistantaj museaj aroj de la specimenoj de la vivaj kulturoj de la fusariumoj estas ne sufiĉe plenaj por la entreprenita laboro. Tial ni nun turnas al mikrobiologiaj, mikologiaj kaj fitopathologiaj laboratorioj kun peto helpi nin per sendo de la vivaj kulturoj de la fusariumoj aŭ de la specimenoj de la plantoj infektitaj per la fungoj.

Por ke en presotaj artikoloj pri rezultoj de la esploro ni povu ĝuste priskribi devenon de la kulturo, necesas aparte de sendataj kulturoj sendi al ni leteron en kiu rimarki:

(I) Nomon kaj adreson de la sendanto, la kultura laboratorio aŭ persono.

(II) Nomon de la planto el kiu estis eligita la sendata kulturo.

(III) Ĉu oni volas nomojn de la specoj sendataj.

Ĉiu sendinto al ni la kulturojn aŭ la specimenojn ricevos unu ekzemplero de la presota monografio pri la *Fusariumoj*.

Kun la plej plena estimo,
—M. Dunin, V. Galič, N. Goldmacher,
N. Fejginson.

23, xii-1925.

KONTRAŬVOLA, KVANKAM PRIPENSITA ŜTELO.

Amuzan historion priskribas iu pola gazeto. Edzino de inĝeniero en Sosnowiec, s-ino N. N. veturis Varsovion. Por la vojaĝkostoj kaj aĉetotajoj la edzo destinis al ŝi 500 zlotojn. La monsumo konsistis el kvin tute novaj bankbiletoj po 100 zlotoj.

S-ino N. N., havante ankoraŭ alian monsumeton, aĉetis per ĝi biletan al Varsovio.

Post iom da tempo eniris la kup-eon iu elegante vestita kaj ne malpli elegante aspektanta sinjorino. Inter la sinjorinoj komenciĝis simpatia interparolado pri vetero, vestaĵoj kaj similaj aferoj, kiel okazas ofte dum vojaĝo.

Iumomente la parolado devis interrompiĝi, ĉar s-ino N. N. estis ial devigata forlasi por unu momento la kupeon kaj sian elegantan kunvojaĝanton.

Post mallonga foresto revenis s-ino N. N., kaj ŝia unua penso estis, kontroli la enhavon de sia monujo. Ŝi malfermis ĝin, kaj — ho ve! — 500 zlotoj malaperis sen ia postsigno.

La inĝenieredzino suspektete ekigardis la elegantan sinjorinon; sed ĉi tiu sidis plej trankvile kaj kun la plej senkulpa mieno.

S-ino N. N. ĉagreniĝis: ŝi devas aĉeti diversajojn en Varsovio, —dume troviĝis tiu ĉi ŝtelistino, kiu ŝin tiel malhoneste elrabis.

Nenian riproĉon ŝi povas al ŝi fari,

SIXTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS.

It has been decided to hold the next Australasian Congress at Hobart during Easter, 1927.

All applications for information and subscriptions should be forwarded to the following local Secretaries:—

VICTORIA:—Mrs. E. S. Bigelow, 36 Kangaroo Road, Oakleigh.

NEW SOUTH WALES—Mr. F. T. Simon, c/o Sydney Esperanto Society.

SOUTH AUSTRALIA—Mr. W. L. Waterman, 26 Henley Road, Torrensville.

WESTERN AUSTRALIA—Mr. C. Caine, 4 Norbert St., East Perth.

TASMANIA—Mr. D. Guilbert, Lands Department, Hobart.

NEW ZEALAND—Mr. W. H. King, Postal division, Secretary's Office, G.P.O., Wellington.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ĉar ŝi vidis nenion konkretan. Cetere la vagonaro estas kuranta, kaj proksime mankas la polico.

Post iomtempa veturado en embarasa silento la eleganta sinjorino, same kiel antaŭe s-ino N. N. estis ankaŭ devigata forlasi la kupeon.

Profitante tiun tempon, s-ino N. N. malfermis la monsaketon de l' nekonata kunvojaĝantino kaj rigardis internen. Kaj kion ŝi vidis? Jen en la monsaketo kuŝis kvin tute novaj bankbiletoj po 100 zlotoj.

"Jen mi havas cin, ŝtelistino!" ek-krias en penso s-ino N. N., kaj 500 zlotoj transiras ree en ŝian monujon.

Kiam la eleganta sinjorino revenis en la kupeon, s-ino N. N. aludis pri la okazo per neniu vorto, ĉar ŝi ne emis perdi tempon per policaĵ protokoloj kaj poste juĝoj. Pro kio kaŭzi skandalon, se ŝi jam ricevis siajn 500 zlotojn?

En plej bona harmonio parolante ree pri vetero, vestaĵoj kaj ĉapeloj, la du sinjorinoj alveturis Varsovion. Tie ili disiris, kaj la leganto opinas verŝajne, ke tio estas jam la fino de nia historio.

Guste ĉi tie venas la plej interesa momento. Post la reveno de s-ino N. N. el Varsovio, inter ŝi kaj la inĝeniero, ŝia edzo, komenciĝis la jena dialogo:

Edzo: Nu, kiel vi pasigis la tempon en Varsovio?

Edzino: Bonege! Vidu, kiom da aĉetoj mi faris!

Edzo: Vere mi vidas; sed diru al mi, amata, de kie vi prenis la monon por tio?

Edzino: De kie? Ja vi mem donis al mi 500 zlotojn!

Edzo: Jes; sed vi ne kunprenis ilin, ili kuŝas sur la skribotablo.

Tiel la situacio estis klorigita, kaj s-ino N. N. intencas nun, per gazetanonco serĉi la elegantan sinjorinon kaj redoni al ŝi la 500 zlotojn.

Komune prilaboris AER-anoj.

—Heroldo de Esperanto.

Nenio estas vera laboro, escepte se vi plivolas okupi vin pri io alia.—J. M. Barrie.

Kuraĝo estas la temo. Ĉio foriĝas se kuraĝo foriĝas. Kion diras la glorfama Johnson pri kuraĝo? "Escepte se homo havas tiun virton li havas nenian certigon pri kiu konservi iun alian."—J. M. Barrie.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko,

Post unu jaro de esplorado en la nordo de Aŭstralio, Kapitano Wilkins antaŭ nelonge revenis al Sydney. Li diris:—Ni pasigis iom da tempo en Goyder kaj King rivero distriktoj, kaj en tiuj distriktoj loĝas indiĝenoj, kiuj laŭokaze kutimas al kanibalismo. Juna indiĝeno kiu laboradis ĉe la ten-dejo estis mortigita dum duelo, kaj ĉar la korpo havas multe da graso, liaj malamikoj decidis manĝi ĝin. La manĝaĵo de la indiĝenoj en tiu parto de la nordo, konsistas plejparte el nuksoj de la *Zamia* palmoj (*Cycadaceae*), beroj kaj fiŝoj. Neniu el tiuj enhavas multe da graso, kaj sekve evidentiĝas grasmalsato inter la gentoj. Sendube el tio rezultas tia kanibalismo al kiu ili kutimiĝas. Tiu grasmalsato estas rimarkita en la nordoriento de Arnheim Land kaj ĉe Groote Eylandt, sed ĉe tiu ĉi loko, sovaĝaj abeloj tiel abundas, ke la mielo anstataŭas la grason.

Mi legis en tagjurnalo (Sydney Morning Herald) la sekvantan rakonton, kiu pruvas la kuraĝon de la indiĝenoj.

—Lordo Apsley kaj liaj kunvojaĝantoj havigis kelkajn unikajn bildojn de kureganta aro de sovaĝaj bubaloj. Ĉasisto kune kun 10 spertaj indiĝenaj rajdistoj, sukcesis peli grandaron da bubaloj proksime al la kinematografia aparato, sed kiam la bubalaro estis malproksime nur 40 metrojn ili kuregis por atako, kaj la tuta detruo de homo kaj aparato ŝajnis neevitebla. Senkonscia pri la danĝero, la kinematografisto daŭre turnis la tenilon de la aparato. Mirakle li estis savita. Indiĝena rajdisto kureganta tuj antaŭ la bubalaro, pafante senkuglajn kartoĉojn en iliajn vizaĝojn, je la tuja risko ke li estus kornvundita de la jam furiozaj bestoj, sukcesis deturni ilin iomete, kio lasis la kinematografiston forkuri. La aparato estis renversita, sed la filmoj ne difektigis.

Miro pri la perfekteco atingita je la antaŭurba elektra fervoja sistemo ĉe Melbourne estis la sento esprimita de sinjoro W. H. Sawyer, la amerika elektra inĝeniero, kiun la Viktoria Registaro dungis por raporti pri la elektra fabrikanta maŝinaro ĉe Yal-lourn. Sinjoro Sawyer diris:—Oni venigis min al Melbourne por doni konsilon pri problemo de Elektraarto. Malpli ol 2 tagojn post mia alveno mi

trovis, ke funkciadas ĉe Melbourne elektra entrepreno de tia grandeco kaj tia efikeco, ke mi sentas ke estos mia devo antaŭ ol foriri de Aŭstralio sciigi pri multaj detaloj pri la sistemo, por ke mi povu doni la informon al amerikaj inĝenieroj por gvidi kaj helpi ilin.

— La Melbourne elektra fervoja sistemo estas rilate al komforteco, kaj sendanĝereco, multe pli bona ol ia entrepreno de komparebla grandeco kiun oni povas trovi en Ameriko.

— Mi havis la plezuron ĉeesti la autuna ĉevalkurado ĉe Flemington (antaŭurbo de Melbourne fama por sia ĉevalkurejoj) kaj tio ebligis min vidi la Melbourne elektran fervojan sistemon funkciadantan dum la plej aferplena tempo. La facileca kaj senĝeneca traktado de la homamasoj, kiuj ĉeestis la ĉevalkuradojn en kio ŝajnis al mi rekorda tempo, miregis min. Sinjoro Clapp, Prezidanto de la Fervoja Administrantaro informis min, ke vagonaro povas eniri la stacion kaj post la eliro de la homamaso lasi la stacion en 40 sekundoj. Mi ne povis kredi tion, kaj per mia poŝhorloĝo kontrolis la tempon, kaj je mia mirego mi konstatis ke sinjoro Clapp troigis la halton po 5 sekundoj.

Kun amika saluto, via fidele P. H.

HUMORAĴOJ.

Paderewski.

Patrino kaj ŝia filino sukcesis penetri en la salonon de la fama fortepianisto Paderewski. La filino estis sufiĉe fiera pri sia talento kaj la patrino volonte aŭdis la juĝon de la mastro pri ŝia ludado.

La fraŭlino eksidis antaŭ la piano.

Paderewski aŭskultis, almenaŭ li ŝajnigis tion, dum la patrino samtempe piedfrapadis. Fine, post la lasta maldolĉa frapo, la filino ekstaris kaj la patrino plezurigis.

“Diru al mi konfidecie, mi petas” ŝi mallaŭte diris al la virtuozo, “kion vi pensas pri ŝi?”

“Sendube ŝi estas bonfarema!”

“Bonfarema?”

“Jes,” rediris Paderewski afable, bonfarema, ĉar ŝia maldekstra mano ne scias, kion faras ŝia dekstra!”

Post la Esperanto-ekzameno.

Patrino: “Ĉu vi trovis, ke la demandoj estas malfacilaj?”

Filino: “Ne, panjo, ne la demandoj, sed la respondoj!”

ESPERANTO POR RADIO—RADIO PER ESPERANTO.

Novaj esperantaj kursoj de ekster-eŭropaj stacioj estas komencitaj en Melbourne (Aŭstralio), Viktoria (Kanado), en Meksiko kaj en Montevideo (Urugvajo).

Radio-Paris. — La kurso gvidita de D-ro Corret finiĝis post 40 lecionoj kun ŝatinda sukceso. La gvidinto uzis dialogan metodon, venigante konstante en la stacion fremdlandajn esperantistojn, por ke la aŭdantaro elternu la plej internacian prononcadon kaj konvinkigu pri la malgrandeco de la prononcdiferenco ĉe la anoj de diversaj nacioj. Estis tiamaniere prezentitaj 14 diversaj nacioj.

En la Soveta Rusujo la radiomovado estas forte ligita kun la Esperanta. La registaro rekonis Esperanton, presiginte poŝtkartojn kun esperanta surskribo “poŝta karto” kaj poŝtmarkojn 7 kaj 14-kopekajn kun surskribo en Esperanto “Inventisto de Radio Popov.”

La potencega Moskva stacio je nomo de Kominterno disaŭdigas dufoje monate Esperantajn paroladojn.

La malpli potenca stacio de Moskva sindikatuigo (M.G.S.P.S.) sendas dufoje semajne esperantan kurson. La profesia sindikato de poŝt- kaj telegraf-oficistoj faris tre favorajn decidojn pri Esperanto, uzas ĝin por eksterlandaj rilatoj kaj havas en multaj urboj esperantistajn rondetojn.

La ĉefa radioamatora ĵurnalo Radiamatoro donas regule resumojn de siaj artikoloj en Esperanto kaj havas eĉ nur esperantan fakon “sovetlanda radiokroniko.” En la sama ĵurnalo aperis kelkaj bonegaj propagandartikoloj pri Esperanto. Estas citinda la nomo de nia fervora samideano, S-ro Javoronkov, kiu estas la ĉefa propagandisto de Esperanto en poŝttelegrafaj medioj.

RECENZO.

BUKEDO, kolekto de literaturaĵoj originaloj kaj tradukitaj de diversnaciaj aŭtoroj. Reviziita de Zanoni. Dua volumo. T. & H. Jung, Horrem bei Koln, Germanujo.

Jen alia kolekto de originaloj kaj tradukoj, kiuj unue aperis Esperante en Heroldo de Esperanto. La dek tri noveletoj estas rikoltitaj el dek landoj kaj formas bukedon, kiu donos ĝuon al ĉiu leganto. (C.W.B.)

OUR READERS' OPINIONS.

A PLEA FOR ESPERANTO.

(To the Editor.)

Sir,—I read with much interest "Soft Goods" letter and would like to console him if I may presume to do so by quoting an authority, the vice-president of the Australian Commercial Travellers' Association at the Esperanto Congress in Sydney, at which I was present. He said he spoke on behalf of 1500 fellow commercial men in urging all who were local business men or commercial travellers to get above interesting themselves in too much petty localisms and get to know their fellow business men everywhere by the easiest means, the neutral international language, essential to foreign trade the world over. Nothing conservative about this: thousands learning by radio, gramophones, or self teachers' text books—a few months' interesting study, a few hours' weekly of your spare time. On a tour north last week, I learned much interest was shown in our local radio chats and newspaper notes. A good deal of literature is being sold in New Zealand. The Duke of Connaught will, for the second time, preside over the Universal Esperanto Congress to be held in Edinburgh the first week of August. His brother, Edward VII, was also a supporter of a neutral international language to take the place of German in Central Europe, which is the aim of the League of Nations and the Republics of Europe support. So get a bigger idea of things even than the Hon. G. Fowlds, and join us.—I am, etc.,

MRS. J. L. KING.

--The Gisborne Times, Tuesday, May 4, 1926.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 6; Amikeco, 4; Abeider Esperantisten, 2-3; Bulgara Esperantisto, 6, 7; Bulteno Antverpena, 3; Bulteno de Internacia Sciencia Asocio Esperantista, 2; Die Einheitsfront, 12, 13; Heroldo de Esperanto, 21 ĝis 25; Itala Esperanta Revuo, 3 4-5; Kalifornia Folieto; La Suno Hispana, 106; La Revue de la Univers, 31; La Fervojisto, 6-7-8; Le Monde Esperantiste, 1; La Revuo Oriento, 4; La Progreso, 34; Munkaskultura, aprilo; Oomoto, 14, 15; Oomoto Internacia, 3, 4; Portugal-Esperanto, 3; Esperanto (Romana), 11; Revista del Atenco, 20; Radio de Filintern, 1 ĝis 5; Svenska Esperanto, 3.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.